



TEA-BULTENO

19^A JARO - N^o 134

NOVEMBRO - DECEMBRO

N. 11-12/2016

Nur la neutileco de la unua diluvo malebligis al Dio sendi la duan.
Sébastien-Roch Nicolas Chamfort (franca revoluciisto, 1740-1794)

Karaj Gelegantoj,

Jam en viaj manoj la lasta Bulteno de la jaro 2016! La venonta ricevos la numeron 135^{an} kaj signos la 20^{an} jaron de ĝia apero. Preskaŭ nekredblas, ke pasis jam tiom da jaroj, de kiam ne plu aperas La Eta Gazeto (*ĉu vi rememoras ĝin?*), kaŭze de la tragika morto de nia kara Aldo Viotto, ĝia responsa direktoro kaj motoro de la TEA-aktivado.

Sed mi ne kuru tro antaŭen, ĉar mankas ankoraŭ du monatoj antaŭ la jarfino kaj prefere ni kune iom rigardu malantaŭen por konstati, kion ni sukcesis intertempe organizi. Nur unu granda aranĝo estis konkretigita, nome la ekspozicio "Filatelo kaj Esperanto" en tre prestiĝa situo, nome la Poŝta kaj Telegrafa Mezeŭropa Muzeo de Triesto. Kunlabore kun kaj helpe de ĝia direktorino, d-ino Chiara Simon, estis muntita sur 15 paneloj vasta gamo de

filatelaĵoj koncernantaj la internacian lingvon. La sufiĉe kontentiga nombro de vizitantoj esprimis ne nur sian pozitivan aprezon pri la prezentita materialo, havanta i.a. grandan historian valoron, sed ankaŭ montris sian ŝat-on pri la uzita procedo por diskonigi kaj klarigi la temon "Esperanto".

La laborado por tion pretigi forprenis nian tutan liberan tempon, tiel ke nenion alian eblis iniciati. Tamen en decembro okazos la 3^a ekspozicio pri pentraĵoj, "Premio Angelo Soranzo", kies temo estas "Paco". La verkoj estos eksponitaj de la 2^a ĝis la 9^a de decembro en la TEA-sidejo: pliajn informojn oni trovos je la 6^a paĝo. Varme vi estas invitatataj ĉeesti kaj inaŭguron kaj premi-disdonadon! Dankon!

Por fini, mi kore dankas vin pro via konstanta legado de ĉi informilo kaj, iom antaŭtempe, tutkore bondeziras al vi Bonan Jarfinon!

Elda

KIO EL KUBO? SUKCESA KAJ PROMESPLENA ORIENTA RENKONTIĜO EN GRANMA!

De la 22^a ĝis la 25^a de septembro okazis, en la belega naturo rande de Montaro *Maestra*, en la Kampadejo Salto de Jibacoa (Manzanillo, Granma) Esperanto-Renkontiĝo de la Orienta Regiono kun partopreno de 45 esperantistoj venintaj el kvin kubaj provincoj: Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Villa Clara kaj Havano). Tie, malgraŭ troa vespera abunda pluvego, la organizantoj brile zorgis pri enhave suka evento. Gonzalo Collantes García (Santiago de Cuba), prezidanto de la Kuba Sekcio de ILEI, respondecis pri la instruista trejnado. Li provizis ĉiujn per abunda lernajaro rilate didaktikon kaj metodikon kaj 11 el ili sukcese trapasis la instruistan ekzamenon. Krome, kun Javier Ramos Nistal (Havano), li gvidis malenuigan kurson por komencantoj. D-ro Wilfredo Díaz Hernández (Granma), prezidanto de la Klubo Martí-Zamenhof, prelegis pri la idearo de Martí kaj la humanismo de Zamenhof. Alberto Fernández-Calienes Barrios, prezidanto de KEA, Havano, prezentis la diskuttemon "Esperanto, fenestro al la mondo. Kion fari post la kurso?" surbaze de personaj spertoj. Aparte interesa estis "Interŝanĝo kun la prezidanto de KEA", kiu komenciĝis tuj post la ves-



permanĝo kaj finiĝis noktomeze pro la multaj demandoj, opinioj kaj kolektiva deziro plibonigi nian agadon.

Antaŭ nia alveno en Granma ni estis informitaj pri la bona rezulto de la inspekto de la Ministrejo pri Justico sur la Provinca Filio. Ni havis ankaŭ inviton partopreni kunsidon de la loka Estraro kun reprezentantoj de tiu ministrejo kaj de la Provinca Direkcio pri Kulturo, okazintan la 22^{an} antaŭtagmeze. Tie eblis aŭskulti de la lokaj aŭtoritatoj laŭdon al la plurjara laboro de nia provinca filio kaj kune kun ili, estis substrekita la bezono ricevi moralan subtenon por pli efike plenumi la laboron. Ni certas, ke tiu kunsido signos novan etapon por Esperanto en Granma.

Raportis Alberto Fernández-Calienes Barrios

Gratulojn, karaj Kubaj Geamikoj, kaj ... ĉiam antaŭen! Samideane, TEA

Laste trovitaj!

Senlimas mia esploro pri la Esperanto-historio pere de poŝtaj kartoj: en ĉi lastaj tagoj bonŝanco ridetis al mi dum esplorado en aŭkciaj retpaĝoj. Temis pri unu el multaj poŝtkartoj kun bildo de nia



Zamenhof, tiu eldonita de Esperanto Verlag Möller & Borel. Tiu eldonejo estis kunfondita de Jean Borel kaj Wilhelm Möller en 1903, en Berlino. Ĉi entrepreno, danke al ilia inteligenta zorgado, liveris la bezonatan lernomaterialon al germanoj krom pluregaj broŝuroj pri la lingvo Esperanto. Jean Borel

iom poste fondis kaj redaktis la *Esperantan Bibliotekon Internacian*, kolekton de originaloj kaj tradukoj fare de diversnaciaj esperantistoj, al kio ankaŭ li mem, per siaj tradukado kaj verkado, ege kontribuis.

Kaj jen kurioza hazardo: en 1911 li vojaĝis tra Triesto, survoje al Grekio kaj Sankta Lando. Lia raporto legeblas en *Germana Esperantisto*, decembro 1911.

El *Vojaĝaj impresoj* - En neniu cirkonstanco oni pli agrable sentas la praktikan utilecon kaj ravan ĉarmon de nia esperanta lingvo ol dum internaciaj vojaĝoj. [...] La lastan someron mi renovigis la sperton en Orientaj landoj, kie mi havis la plezuron renkonti multajn, al mi ankoraŭ nekonatajn samideanojn. [...]

Mia marvojaĝo komenciĝis en Triest, kie nia afero kalkulas bonegajn apostolojn. Ĉar mi estis anoncinta mian viziton al nia samideano, Dro Artur Ghez, la animo de la esperantomovado en Triest, li kunigis la tutan anaron en la klubejo. Mi havis la plezuron renkonti tie ital-, german-, slovak-, grek-lingvanojn, kaj kun ĉiuj estis la konversacio plej facila kaj agrabla. Ĉarman vesperon ni pasigis kune, komencante en la grupejo, kies muroj estas ornamitaj per ĉiuspecaj esperantaĵoj kaj per bela portreto de Dro Zamenhof, pentrita de Triesta artisto. La klubejo estas riĉe provizita per esperantaj gazetoj el ĉiuj mondpartoj. Dum la tuta vespero, sed precipe dum la "dua akto" pasigita sur la belega Piazza grande, apud la marbordo, kie la urbanaro promenas nokte, aŭskultante muzikon, mi ĝojis pri la natura, gaja spriteco de la Triestanoj, en kies societo la tempo ĝis malfrua horo tro rapide pasas. Oni tie sentas sin vere en suda lando, ne nur pro la 40 gradoj en ombro dum

la julia monato, sed pro la ankoraŭ pli varma akcepto, la bonhumora interparolo kaj viveca karaktero de la Adriatikanoj. La glacio estas rompita tuj ĉe la unua ekvido, se eĉ oni povas paroli pri glacio en tiaj cirkonstancoj!

Tre vigla estas la esperanta movado en Triest. [...] Nepre favora estas la tuta Triesta gazetaro, kelkaj ĵurnaloj publikigas regule esperantajn artikolojn. La feliĉa urbo Triest ŝajnas esti unu el la paradizetoj de Esperantujo. Dum tiuj tagoj angla milit-ŝiparo estis en la Triesta haveno, kaj mi demandis, ĉu ne estus eble viziti unu el tiuj majestaj kirasŝipoj. S-ro Ghez tuj respondis, ke sur la admirala ŝipo estas esperantisto, S-ro Small, estro de la senfadena telegrafio, kaj ke oni morgaŭ klopodos plenumi mian deziron per lia helpo. La morgaŭa tago estis dimanĉo, kaj matene dekduo da samideanoj kaj mi enŝipiĝis en malgranda boato, por iri al la granda militŝipo H.M.S. Exmouth de la Malta eskadro. S-ro Small, vokita de ni, venis malsupren al nia boato kaj diris, ke bedaŭrinde estas malpermesite viziti la militŝipojn, sed ke li tamen provos peti la permeson de lia Admirala Moŝto, dirante, ke ĝi estas por esperantistoj. Kelkajn minutojn poste li ĝoje revenis, alportante la admiralan permeson. Dum longa tempo ni detale vizitis la potencan kaj interesegan kirasŝipon de supre ĝis malsupre, kondukita de nia kompetenta gvidanto S-ro Small, kiu ĉion klarigis al ni plej agrable en nia kara lingvo. Ho, mistera povo de la verda stelo, kiom da mirindaĵoj ni jam ŝuldas al vi! [...]

Eble iom longan enkondukon mi prezentis antaŭ la aperigo de la ĵus akirita poŝtkarto, tamen la aludo al Triesto ŝajnis al mi vere nepreterlasenda. Kvankam la Zamenhof-karto ne estas tiom malkutima, nome tute ordinara, male la dorsa flanko surhavas tre interesan tekston kaj precipe la nomoj de la subskribinto kaj adresito havas apartan gravecon, almenaŭ por tiuj kiuj interesiĝas pri la Esperanta historio.



G. Moch



Mallonge, la sendinto - Gaston Moch - skribis al sia amiko - Émile Arnaud -, proponante tagmanĝon siahejme por diskuti ian Regularon.

Kiuj ili estis? Kaj pri kiu Regularo ili interparolis?

Al la unua demando facile respondeblas. G. Moch (1859-1935) estis franco, kiu karieris kiel artileria oficiro ĝis 1894. Kurioze estas, ke en februaro 1893, per artikolo, pseŭdonime subskribita (*Patiens*), en *La Revue Bleue*, tima literatura revuo, li turnas sin al la legantaro por klarigi, kial la komuna opinio, ke milito inter du grandaj, modernaj potencoj estus tre mallonga, estas absolute malvera. Post sia eksiĝo kiel oficiro, li ekpublikigis verkojn milittemajn. En 1895 (*ndr: duba dato*) li plene engaĝiĝis en la pacifistan movadon, interplektante sekve amikajn rilatojn kun Baronino Bertha von Suttner, la Nobel-premiitino pri Paco, Charles Richet kaj Émile Arnaud, la adresito en la poŝta karto.



1898 - Portreto de G. Moch, farita de Félix Vallotton.¹⁾

Jam en 1889 G. Moch eklernis Esperanton, tuj aktivigante parole kaj verke. En marto 1900, post lia prelego pri la lingvo, estis fondita la Pariza grupo, kiun li prezidis. La 6^{an} de aprilo 1905, laŭ lia propono, grupo da eminentaj esperantistoj, el kiuj la konataj C. Bourlet, G. Chavet, F. de Ménil, P. Fructier, V. Chaussegros k.a., fondis la

Internacian Societon Esperantistan por la Paco "PACIFISTO". Tiutage estis akceptitaj la provizoraj regularo kaj komitatanoj, inter kiuj ankaŭ Émile Arnaud, notario. [*Ĉu eble, kiel skribite en la poŝtkarto datita 16 12 06, s-roj Moch kaj Arnaud devis diskuti ĝuste tiun regularon?*] Samtempe estis decidita ankaŭ la apero de revuo, nomita *Espero Pacifista*.

Sed bedaŭrinde oni devas alkalkuli lin al tiuj, kiuj deziris disponi pri strikte perfekta lingvo, tial daŭre li lanĉis novajn reformojn, kiujn Zamenhof ade estis rifuzinta. Fiaskinte kun la Majstro, li klopodis altiri al sia reformemo Louis-on de Beaufront, kiu fine cedis kaj aliĝis al lia ideo. Oktobre 1907, G. Moch anstataŭis profesoron Boirac en la Komitato de la *Delegacio por alpreno de lingvo internacia*, kiu fine de kunsido decidis elekti principe Esperanton, kondiĉe ke estu efektivataj kelkaj ŝanĝoj en ĝi. Kiel sciante, iom post iom, ekde 1910, ĉio iasence restis balanciĝanta en inerta stato, kio konsekvence kaŭzis nur grandan konfuzon kaj seniluziigojn inter la samideanaro, sekve de kio multaj eskapis el la esperantistaj vicoj, ankaŭ pro la klare deklarita, perfida trompo de L. de Beaufront, nome "lia reformprojekto Ido" [*ndr: pri lia (kun)aŭtoreco restas ankoraŭaj*

duboj]. Jam de tempo G. Moch malproksimiĝadis de Esperanto, ĝis kiam, definitive, en 1913²⁾ li tute sin dediĉis al Ido. Baldaŭ ankaŭ tiu reformita sistemo ne plu lin kontentigis kaj - laŭ Louis Bastien - en la 1930^{aj} jaroj forlasis por ĉiam ian ajn ideon pri planlingvoj.

Returne al la poŝtkarto, kelkaj vortoj direndas pri lia amiko kaj samideano Émile Arnaud, sam-ideano rilate kaj al Esperanto kaj al Pacifismo. Émile Arnaud (1864-1921), franca advokato kaj notario, estis ankaŭ verkisto konata pro sia fervora kontraŭmilitismo kaj krome "elpensinto" de la vorto "pacifismo". En 1901 li skribis eseon titolitan *Paca Kodo*, en kiu li difinis kaj priskribis la celojn kaj metodojn por movadi favore al paco. Li fondis la *Ligon Internacian por la Paco kaj Libereco*, kies unua prezidanto li iĝis. Plej probable pro la komuneco de ideoj kaj idealoj li amikiĝis kun G. Moch kaj sekve eklernis la lingvon. En la *Pacifisto*, *Internacia Societo Esperantista por la Paco*, legeblas (pĝ. 5^a) ke "estis elektataj, unuvoĉe, kiel provizora komitato, Sinjoroj: ARNAUD, Émile, notario, vicprezidinto de la 13^a Kongreso de la francaj notarioj; membro de la Komisiono internacia por la Paco (en Berno) [...] kaj prezidanto de la Ligo internacia por la Paco kaj Libereco (Berno) [...]". El la *Ĝeneralaj Observoj pri la regularo*, je paragrafo 1^a legeblas — "La Societo Esperantista por la Paco havas la esencan celon propagandi ne Esperanton, sed la pacifisman ideon. [...]" Je la 2^a § — "Tiel Esperanto estas por la Societo fakto efektivigita. Ĝi estos la unua societo, kiu konsideris tiun lingvon, ne kiel celon, sed kiel rimedon." El ĉio ĉi eblas konkludi, ke É. Arnaud estis ja esperantisto, sed bedaŭrinde nenion alian mi sukcesis trovi pri li, krom lia pacifisma aktivado, rilate lian engaĝiĝon en la Esperanto-movado.

Estus bele ankoraŭ ion plian ekscii pri Arnaud: ĉu eble vi kapablas ion aldoni? Mi atendas viajn mesaĝojn. E.D.

Notoj:

- 1) Félix Vallotton naskiĝis en Lausanne, Svislando, en 1865, kaj mortis en Parizo en 1925. Li estis multfaceta artisto: pentristo, gravuristo, ilustristo, skulptisto, artritikisto kaj roman-verkisto. Li sekvis la *Nabis*-movadon (post-impresionisma avangarda movado). Kunlaboris kun *La Revue Blanche*, belga literatura revuo en kiu oni aperigis multajn liajn ilustraĵojn pri tiutempaj eminentuloj.
- 2) De 1905 ĝis 1912 Gaston Moch estis membro de la Lingva Komitato. Li estis eksigita pro kontraŭesperanta agado (*surbaze de la artikolo de Louis Bastien en Enciklopedio de Esperanto - EdE*).

Fontoj: EdE; Vikipedio; Germana Esperantisto; Österreichische Nationalbibliothek

Senfina historio

Ĉu definitive finita la batalo kontraŭ la palma oleo?

Se oni en ĉi lastaj du monatoj iom pli atenteme observadis la ujojn enhavantajn la plej diverstipajn nutraĵojn, precipe tiujn industrie produktitajn kiel biskvitojn, salbiskvitojn, kuketojn, kaj simile, aŭ spektis la reklamojn televidajn, certe oni rimarkis, ke sur ilia eksteraĵo aperas la indiko: **sen palma oleo**, okulfrape evidentigita. Nu, kio okazis? Havis sukcesan rezulton la kampanjo komencita antaŭ du jaroj de *Fatto Alimentare* (Faktoj pri nutraĵoj) kaj *Great Italian Food Trade* (defende kaj promocie de tipaj italaj nutraĵoj) kontraŭ la uzado de tiu danĝera oleo. Grandaj markoj, precipe televide, propagandas nun siajn varojn, evidentigante kaj solene proklamante, ke: NE PLU PALMA OLEO! Grandioza venko?!? Eble, sed oni singardu, ĉar la ekonomia premo/potenco povus subfosi iam ajn eĉ la plej indan iniciaton. Ni ne flamiĝu pri venko!

Estas interese nuntempe rimarki, kiom da famaj, famegaj italaj markoj, per intensa propagando ĵurnala, radia, afiŝa, klopodas konvinki la konsumantojn, ke ilia entrepreno ne plu uzas - kaj uzos - en siaj nutrovaroj la palman oleon. Post esti elspezintaj la 'moderan' sumon de 10 milionoj da eŭroj por blage/dise klarigi al italoj la benefikojn al sano kaj medio de tiu oleo, nun tiu reto de la industria nutro-sektoro retropaŝas por komplete ŝanĝi sian agadon, riskante perdigi al ĝi la ĝis nun akiritan, avantaĝan lokon sur la monda merkato.

Laŭ lastaj informoj, fine de septembro ĉijara, en Italio, jam kalkuleblas ĉirkaŭ 800 industriaj forno-produktaĵoj senpalmoleaj, kaj entute 14 entreprenoj decidis forigi tiun ingrediencon.

Bedaŭrinde notindas, ke la presorganoj ne tiom disvastigas la proajn kaj malproajn argumentadojn, malgraŭ ke ĝuste ili havas la devon plej verece kaj senvuale prilumi sian legantan publikon pri ĉi grava temaro.

Sed *estas tubero en la afero*. Komenciĝas nun alia ĉapitro de la *sap-opero*. Antaŭ 3-4 tagoj, mi ne precize memoras, dum la senfinaj minutoj de televida reklamo, ŝoka kaj absurda anonco altiris mian atenton: iuj proponis la tre konatan kremon *Nutella*, kaj seriozmiene dirakontis al la aŭskultantaro pri la tre sanigaj efikoj de tiu frandaĵo, substrekante, ke la uzata palmoleo estas tute sendanĝera, male tre benefika, inkluzivigenda senprobleme en la dietojn de infanoj, knaboj, plenkreskuloj kaj maljunuloj: do, aŭtentika vivo-eliksiro! Mi de jardekoj nek konsumas, nek konsumigas tiun kremon, tial mi ne havis subokule la liston de ĝiaj ingrediencoj. Pro tio, unue nepris vizito

de Vikipedio: tie mi trovis, ke la averaĝaj nutrovaloroj en 100 gramoj konsistas en ĉ. 56,7 g da sukero, 31 g da grasoj el kiuj 10,9 g saturitaj, 6,8 g da proteinoj. Aliaj ingrediencoj en eta kvanto jenas: aveloj, kakao, senkrema pulvora lakto, vanilino, ka. Post akiro de tiuj sciigoj, sekvis navigado en la ttt-ejo de *Nutella*: tie oni povas mem malkovri, ke la entrepreno sin gloras uzi la plej altkvalitan palmoleon en la mondo kaj ke ĝi estis eĉ premiita pro sia avangarda engaĝiĝo en la lukto kontraŭ senarbarigado. Bedaŭrinde mi ne sukcesis malkaŝi la ekzaktajn procentojn de la diversaj ingrediencoj en la kremo. Nu, dum mia venonta superbazarumado mi mem kontrolos la priskribojn sur la ujo. Intertempe, kaptis mian atenton la rezultoj de enketo farita de *la Verbraucherzentrale Hamburg*, germana organizo okupiĝanta pri konsumoj kaj informado: tiu enketo estis farita junio 2015. Oni faris eksperimenton por propraokule vidi la unuop-an dikecon de la diversaj ingredienc-tavoloj, etenditaj unu sur la alia en la vitra ujo: klare evidentiĝis, ke en ĝi surtavoliĝas ĉirkaŭ du trionoj da sukero kaj 20 procentoj da palmoleo; krome enestas, pli etkvante, aveloj, kakao, senkrema pulvora lakto (*vd. la foton*).



Farita kun amo - tia estas ilia devizo! Sed, amo al kiu? Al infanoj, al homoj aŭ al ... mono? Nutella? Ne dankon! *Via redaktanto*

1957 - EI L' ESPERANTO

Itala Esperanto-Federacio

La unua "via Esperanto" en Italio

La Komunuma Konsilio en *Pisticci*, urbeto de pli ol 15.000 loĝantoj, province de Matera (Lukanio), sub prezidado de Urbestro d-ro Nicola Michetti, unuanime decidis doni la nomon "Esperanto" al unu el la ĉefaj stratoj, plenumante la deziron de la samurbano Luigi Minnaja. La decido estis alprenita dum la kunsido de la 22^a de julio kaj la inaŭguro okazos venontan oktobron.

Kiel sciante, jam ekzistas en Milano kaj Bolonjo stratoj titolitaj je doktoro Zamenhof, sed tiu ĉi estas la unua rekte dediĉita al la nomo de la internacia lingvo.

Ekster Italio jam ekzistas tiaj titoligoj. Unu el la lastaj estis tiu de "Placo Esperanto", inaŭgurita en Munkeno okaze de la UK en 1951.

UEA informas, ke...

Biblioteka Apogo BACHRICH subvencias naŭ bibliotekojn

La Fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Gedzoj Maria kaj Johano Bachrich", kies celo estas subteni kaj pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj, asignis subvenciojn - uzeblajn por akiri librojn aŭ aliajn varojn aĉeteblajn ĉe la Libroservo de UEA - al 9 el la 12 petoj ricevataj okaze de la ĉi-jara alvoko.

La subvencioj ĉi-jare estis: Biblioteko Carlos Domingues, Brazilo (104,70 €) - Eo-Biblioteko de Instituto Zamenhof, Togolando (174,20 €) - Kroata Esperanto-Ligo (157,50 €) - Infanoj ĉirkaŭ Afriko, Benino (353,10 €) - Interkultura Centro Herzberg, Germanio (166,73 €) - Bologna Esperanto-Grupo "Achille Tellini 1912", Italio (83,25 €) - Ĉeĥa Esperanto-Asocio (159,67 €) - **Triesta Esperanto-Asocio, Italio (123,22 €)** - Esperanto-Societo "Tibor Sekelj" Subotica, Serbio (198,79 €).

La kvalito de la ricevataj subvencioj estis mirinde kaj gratulinde alta, komentas Sara Spanò, Estrarano de UEA pri Kulturo, kaj atestas plenkonscian kaj engaĝitan sentemon pri la graveco pligrandigi la havaĵojn de niaj bibliotekoj, unu el la ĉefaj kolonoj de la valorigo de nia kulturo. Nia malfacila tasko estis identigi la plej elstarajn petojn, sed ni esperas alfronti similajn defiojn okaze de la venontaj alvokoj!

Biblioteka Apogo Bachrich, starigita de UEA en 2014 danke al la malavara donaco de la gefiloj de gesinjoroj Bachrich (Venezuelo), alfrontas unu el la plej grandaj kulturaj bezonoj de la Esperanto-movado, ĉar ĝi subtenas Esperanto-bibliotekojn kiuj ne ricevas financan subtenon de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco, kaj kiuj tial riskus ne povi adekvate aktualigi kaj pligrandigi siajn kolektojn.

UEA laboras por krei pli kaj pli da similaj ebloj por plifortigi la Esperanto-kulturon kaj subtenas iniciatojn tiudirekten orientitajn.

Koregan dankon al ĉiuj pro la belega donaco! Triesta Esperanto-Asocio

UEA aĉetis loĝejon por volontuloj en Roterdamo

Sekve de Estrara decido (februare 2016), UEA aĉetis loĝejon kun pluraj dormoĉambroj por volontuloj en Roterdamo. Ĝi situas en la sama strato kiel la Centra Oficejo, je proksimume 10 minutoj piedire.

Tia spaco estas bezonata, klarigas la Ĝenerala Direktoro de UEA, Veronika Poór, ĉar kaj UEA kaj TEJO volas plimultigi la volontulojn en la Centra Oficejo. La bonfarto de niaj volontuloj

estas tre grava prioritato, kaj ni opinias ke la nova domo helpos krei taŭgajn kondiĉojn por ili.

La ampleksiĝo de la Volontula Servo de UEA kaj TEJO jam komenciĝis. UEA jam bonvenigis la unuajn volontulojn elektitajn laŭ malferma alvoko decembre 2015, dum TEJO sukcese petis subvenciojn de eŭropaj instancoj por gastigi pluroble pli da volontuloj ol pasintjare. Nova alvoko baldaŭ sekvos.

La aĉeto de domo estas ankaŭ prudenta financa investo, komentas Martin Schäffer, Ĝenerala Sekretario de UEA. Per lupagoj UEA ricevos pli ol ĝi povus gajni per ordinara bankdepono. Tamen estas ankaŭ grave ke niaj membroj subtenu la Volontulan Domon per siaj donacoj, ĉar tio helpos nin fari ĝin komforta kaj taŭga por la volontuloj kaj kovri la restadon de volontuloj ekster Eŭropo, kiuj ne povas profiti de la samaj subvencioj kiel eŭropanoj.

La Estraro de UEA tre dankas al la donacintoj, kiuj helpis por la aĉeto de la domo per la sumo de 7877,66 eŭroj.

Por ricevi pliajn informojn bv. skribi al: domo@co.uea.org. Donacojn eblas fari al la kontoj de UEA. Vidu: <http://uea.org/alighoj/pagmanieroj> Bonvolu aldoni priskribon: Konto voldom.

MALFERMA TAGO

sabaton la 26^{an} de novembro 2016!

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas por la 45^a fojo al la Malferma Tago; tuj poste, dimanĉe, la 27^{an} de novembro, okazos seminario pri informado.

MT estos dediĉita al la Jaro de la Lernanto: prelegos Mirejo Grosjean, Prezidanto de ILEI, kun titolo: *ILEI inter kreskoj, puŝoj kaj ŝanĝoj, defiplena krozado*, kaj Chuck Smith, kun titolo: *Evoluo de E-lernado kaj E-komunumo post 2000 en interreto*.

Dimanĉe, ni plu uzos la eblon profiti de la spertoj de niaj du prelegantoj kaj de la Ĝenerala Direktoro Veronika Poór por enprofundiĝi en la plej efikaj manieroj informi pri Esperanto kaj en la diversaj aspektoj de tiu agado; por adekvate gvidi la homojn de scivolemo pri Esperanto al aktiva partopreno en la Esperanta komunumo.

Kiel kutime, en la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj, kafo kaj teo estos senpagaj kaj varmaj la tutan tagon. Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo. La programo daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo ambaŭtage ĉe Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Roterdamo, Nederlando.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Pli facilas diserigi atomon, ol antaŭjuĝon.

Albert Einstein (1879-1955)

Novembra Programo	
1-a, mardo	17h30 - Unuagrada kurso
4-a, vendredo	20h00 - Rememore de niaj karaj Aldo kaj Viglo
8-a, mardo	17h30 - Unuagrada kurso
11-a, vendredo	20h00 - Eta trarigardo de Ĝenovo, la ĉefurbo de Ligurio
De la 13a ĝis la 15a de nov.	ZAGREBO 25^a datreveno de KEU Seminario pri lingvo kaj kulturo kroataj, ankaŭ en Esperanto
15-a, mardo	Sidejo fermita
18-a, vendredo	20h00 - Laborpreparoj por la Konkurso "Premio Angelo Soranzo"
22-a, mardo	17h30 - Unuagrada kurso
25-a, vendredo	20h00 - Laborpreparoj por la Konkurso "Premio Angelo Soranzo"
29-a, mardo	17h30 - Unuagrada kurso
Decembra Programo	
2-a, vendredo	17h00 - Inaŭguro de la ekspozicio pri pentraĵoj
6-a, mardo	17h30 - Unuagrada kurso
9-a, vendredo	17h00 - Konkurso pri pentrado - Premio "ANGELO SORANZO" - Disdonado de la premioj
10-a, sabato 10h00	Maribor - Zamenhof-Tago
13-a, mardo 17h00	Triesto - Zamenhof-Tago
16-a, vendredo	20h00 - Italaj poeziaĵoj tradukitaj al Esperanto
17-a, sabato 10h00	Ljubljana - Zamenhof-Tago
19-a, lundo 19h00	Rijeka - Zamenhof-Tago
20-a, mardo	17h30 - Unuagrada kurso
23-a, vendredo	20h00 - Kristnaska Festo
26-a, sabato h. 10-13	Bologna: Kunveno dediĉita al Achille Tellini
27-a, mardo	17h30 - Unuagrada kurso
30-a, vendredo	20h00 - Adiaŭ, 2016^a jaro!

Divenludo de Viglo (TB-sept-okt 2016)

SOPIRO AL LIBERO

La korekta respondo estas:

LA MONTROFINGRO.

Gratulojn al Galja Nikolova el Sliven, Bulgario. Ŝi ricevos libro-donacon.



3^A KONKURSO PRI PENTRADO POR DULINGVAJ VERKOJ PREMIO "ANGELO SORANZO" JARO 2016

La ekspozicio de la konkursantaj pentraĵoj okazos ekde **vendredo la 2^a ĝis la 9^a de decembro 2016**, en la sidejo de TEA, via del Coroneo 15, kun jena horaro: **17.00-19.00**, ĉiutage sed ne dimanĉe aŭ festotage.

INAŬGURA TAGO

Vendredon la 2^{an} de decembro je la 17^a horo

PREMIA CEREMONIO

de la gajnintaj konkursantoj:

Vendredon la 9^{an} de decembro je la 17^a horo

Triesta Esperanto-Asocio atendas vin multnombraj okaze de ĉi tiu jam tradicia evento.

Disvastigu ĉi tiun informon inter viaj amikoj, konatoj, parencoj ...

Bonan Kristnaskon 2016^{an} kaj Pacan 2017^{an} Jaron al la TEA-anoj kaj Gelegantoj deziras Triesta Esperanto-Asocio!



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 17.30-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit—IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org